

## Helpo de la eŭropanoj al la afrikanoj, 3-a parto

Claude Gacond, 87-a radioprelego, 1964.07.29 & 08.01

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la helpo de la eŭropanoj al la afrikanoj. Parolas Claude Gacond.

Pasintan semajnon mi prezentis al vi la situacion de intertropika Afriko laŭ la libro de René Dumont *Afriko malbone startis [L'Afrique Noire est mal partie]*. Hodiaŭ ni daŭrigos la ekzamenon de tiu fundamenta verko, kiu ne nur helpas la afrikanojn pli bone kompreni sian situacion, sed kiu ankaŭ nin helpas metiĝi en ilian haŭton.

La agronomo René Dumont opinias, ke la afrikaj registaroj, anstataŭ celi tujan starigon de peza industrio, devus unue disvastigi metiistajn konojn. Necesas povi fabriki surloke la necesan agrokulturan materialon kaj la kreskigilojn. La plej necesaj uzinoj estas tiuj, kiuj sintezas azoton, ĉar azoto estas la ĉefa elemento de la produktado de la afrikaj grundoj. Kiam agrokulturo kaj la metiaj konoj pli bone fartos, tiam aliaj industrioj jam sekvos; tiuj servantaj al la nutrado, teksado kaj ligna laboro. Sed unue necesas kultivi la bazajn produktojn anstataŭ devi ilin enportadi.

Industrio disvolviĝas ĉiam malrapide, kaj ĝi okupas malmulte da homoj. Longe estos la agrokulturo, kiu asekuras la laboron de la afrikanoj. Tiurilate ŝanĝo de politiko estas absolute necesa : la registaroj devas malpliigi siajn eksportadojn de krudaj varoj, kies mondaj prezoj konstante malaltiĝas, kaj ĉesi enportadi produktojn, kiujn oni kapablas kultivi en la lando mem. Ili devas disvolvi la kulturojn, kiuj ebligas la naskiĝon de industrioj.

René Dumont konstatas, ke la tria strukturo, se ĝi estas konservata, evitus agraran reformon, escepte en Madagaskaro kaj en kelkaj precizaj regionoj, kie la kamparanoj profitas nur pri kelkaj procentoj de siaj rikoltoj, tiom ilin profitantoj ekspluatadas.

Afriko, kiel ĉiuj neindustriaj landoj, nepre devas plej rapide progresigi sian agrokulturon. René Dumont rememorigas al la francoj, kiel malrapide progresis nia agrokulturo, sed liaj diroj fakte koncernas tutan Okcidenton. Inter 1788 ĝis 1914 la jara progreso agrokultura estis nur unu-procenta aŭ du-procenta jare. Dum niaj profesoroj de agronomio jam komencis sian propagandon ekde 1875, necesis atendi ĝis 1950, por ke veraj ŝanĝiĝoj reale komencu efektiviĝi grandskale.

Afriko ne povas imiti Eŭropon tiurilate. Ĝia loĝantaro tro rapide kreskas, dum tiam en Eŭropo la loĝantaro nur malrapide kreskis.

Anstataŭ kritiki la malfacilaĵojn de la landoj, kiuj devas modernigi sian agrokulturon, ni memoru la tempon, kiu estis necesa al nia kontinento, aŭ eĉ nur al parteto de nia kontinento, por tiu moderniĝo. Kaj ni ne forgesu, ke eĉ en la plej riĉaj landoj agrokulturo kaŭzas problemojn, kiuj ne ankoraŭ trovis solvon. Ĉiuj politikaj reĝimoj konas siajn malfacilaĵojn tiurilate : en Eŭropa Ekonomia Komunumo oni disputas pri la prezoj de iuj produktaĵoj, en Eŭropa Unuiĝo de Libera Interŝanĝo, en kiu troviĝas Svislando, la kamparanoj vivas kun la timo de la konkurenco eksterlanda kaj petas doganan tarifan protektadon, en iuj popoldemokratioj, kie perforte oni tro rapide trudis ŝanĝojn, la agrokulturo ne ankoraŭ kapablis produkti la deziratan kvanton. El ĉiuj elsperimentoj, tiuj de Usono, de Okcidenta Eŭropo, de Sovetio, de Israelo, de Ĉinio, Hindujo aŭ Kubo, por citi la plej konatajn, estas imitendaj kaj ankaŭ neimitendaj. Afriko povas profiti pri eksperimentoj. Kio komplikigas ĝian laboron, tio estas la vere malaltaj konoj de la afrika kamparano.

Vi eble memoras pri la ĉapitro koncerne la dezirindecon de la transformo de niaj soldatoj en civilaj helpantoj, kiuj irus diskonigi siajn sciojn en Afrikon. Mi legis tiun ĉapitron kiel enkondukon al la studo de la libro de René Dumont, kvankam ĝi estas la konkludo de tiu valora verko.

## Helpo de la eŭropanoj al la afrikanoj, 3-a parto

Claude Gacond, 87-a radioprelego, 1964.07.29 & 08.01

René Dumont prave opinias, ke tiom longe kiam Eŭropo, Usono kaj Sovetio daŭrigos sian armadan konkurson, anstataŭ diskonigi siajn sciojn kaj helpi la malpli privilegiitajn regionojn de nia planedo, tiam la situacio en Afriko restos eksplodiga.

Se ni estus afrikanoj, jen la problemoj, kiujn ni devus solvi, por nia ekonomia progreso. Ni devus transformi niajn lernejojn, kadrojn, strukturojn kaj precipe eklabori. Nia instruado ne devus formi parazitojn, sed bonajn kamparanojn, tiucele necesus fondi farm-lernejojn, formi monitorojn, kiuj akceptus vivi ekster la urboj. Ni devus pagi la teknikistojn pli multe, ol la aliajn funkciulojn. Nia agrokultura kredito devus favori kooperadon. Ni devus eduki, eduki, eduki. Nian moralan senton ni devus eduki, nian senton pri respondeco. Ni devus emancipi niajn virinojn, ŝanĝi niajn nutro-kutimojn, pliigi niajn laborhorojn, malpliigi niajn salajrojn, akceli nian laborritmon, jen ĉio, kion ni devus fari, se ni estus afrikanoj. Ĉu vi perdis la ekvilibron, aŭdante tion ?

René Dumont konstatas prave, ke ni demandas al la afrikanoj, ĉu kamparanoj, regantoj, funkciuloj aŭ studantoj, klopodojn kaj oferojn absolute esceptajn : ni demandas al ili preskaŭ fariĝi herooj kaj sanktuloj. Kiun titolon ni posedas por al ili tion proponi, ni, kiuj facile vivas dank'al la frukto de la laboro de niaj antaŭuloj, de niaj laboristoj kaj kamparanoj ? Kaj kion ni entreprenis ĝis nun por ilin helpi efike, sin demandas René Dumont, kiun veran oferon ni mem faras ? La momento venis por ni, eŭropanoj, prezenti al la juna afrika kontinento vere honestajn proponojn, nia helpo estu vere neprofitema, ni unue vidu la propran disvolviĝon de Afriko anstataŭ provi plidaŭrigi privilegian situacion. De la respondoj, kiujn ni kapablos alporti al tiuj proponoj, ne nur dependas la estonto de la afrikanoj, sed verŝajne ankaŭ de la eŭropanoj, de la blankuloj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la helpo de la eŭropanoj al la afrikanoj.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-